

# Informilo por Interlingvistoj

7-a jaro (tria serio) ISSN 1385-2191 n-ro 24 (1/1998)

Eldonata de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo  
(UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL- 3015 BJ Rotterdam, Nederlando)

Redaktoro: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin; tel. +49-30-5412633; fax +49-30-5456742; e-mail:  
[blanke.gil@berlin.snafu.de](mailto:blanke.gil@berlin.snafu.de)

---

## 1. La intelektularo, tiu grava, forgesita forto... Strategiaj konsideroj

*Prof. Dr. Florian Bociort*

---

### Antaurimarko de la redaktoro:

Mi longe kaj relative detale sekvis la laboron de prof. Bociort por reoficialigi la rumanan Esperanto-movadon. Lia investo de kuragxo, forto, intelekta energio - sed ankaŭ de financoj - estas ege admirinda. Grandaj ideoj, sen organizi ilian disvastigon, akcepton, aplikon, estas relative sensignifaj. Sed por havi kuragxon, forton kaj intelektan energion por antaŭenigi - sub malfacilaj kaj ankaŭ dangxeraj kondicxoj - ne cxiutagan ideon, prof. Bociort ankaŭ posedas ion alian, sxajne nesciencan, sed sen kio scienco ne ekzistus: modestecon kaj entuziasmon.

Al mi sxajnas prave, ke prof. Bociort atentigas pri la subtakso de la rolo de sciencistoj por la progresigo de la nuntempa Esperanto-movado. Liaj spertoj, kvankam rikoltitaj ja sub tre specifaj cirkonstancoj, estas instruaj, liaj konkludoj pripensindaj. (La elstarigoj en la teksto estas de la aŭtoro mem).

Do, cxi-foje la leganto ne nur legu bibliografiajn informojn, sed ankaŭ cxi tiun eseon pri drameca cxapitro el la historio de la sciencmedia Esperanto-movado, kies cxefrolulo estis Ignat Florian Bociort mem.

---

### Detlev Blanke

En la revuo "Esperanto" mi iam legis: "La sciencistoj ne interesigxas pri Esperanto". En n-ro 3/1995 mi trovis: "Centjaraj movadoj iufoje sxajnas antaŭenmarsxi kun la rapideco de centjara homo". Pri la valida ideo de prof. Lee Chong-Yeong krei grupon de influaj homoj, oni legas plendon en n-ro 4/1996 (p.77): "Mi tute ne komprenas kial krei tian grupon. Cxu mi nun, kiel prezidanto de mia E-grupo, komencu fiflati la politikajn potenculojn de mia urbo?"

Tiaj asertoj estas primeditendaj. Oni ne analizis la kialojn de rapida progreso de Eo en certaj lokoj kaj momentoj de stagnado en aliaj. La rumanaj evoluoj de la movado estas nur unu el la elokventaj ekzemploj.

Ne eblas kaj necesas resumi cxi tie la pli ol 30-jarajn spertojn. Bv. permesi al mi rapide noti el dekoj da situacioj nur ege malmultajn travivaĵojn (do ne historian skizon), por kontraŭi per konkretaj cxiumomente atesteblaj, la spiriton de la supraj tri asertoj kaj sugesti suplementan strategion.

Kiam mi estis gastdocento en Humboldt-Universitato de Berlin (1965-1970), Detlev Blanke varbis min per siaj konoj kaj libroj.

En la Universitato de Timisoara, kie mi fakte laboris, mi argumentis la neceson organizi rumanan E-movadon. Iuj kolegoj diskrete ridetis kaj memorigis pri la kontraŭaj sintenoj de "niaj plej gravaj lingvistoj" Iordan kaj Graur. Komencigxis tiam ne supozata longa vojo: prelegoj en universitataj kaj akademiaz rondoj, memuaroj, audiencoj, grandega informa kaj organiza laboro. Unua varbato: prof. Apreotesei.

Kolego Kiraly akceptis, ke en sia kurso (Gxenerala lingvistiko) la prelegojn pri "artefaritaj lingvoj", faru mi mem cxiujare.

Sed en la Kulturministerio la direktoro Iliesiu, iam mia studento, miras ke mi "enmiksigas en malpermesitan aferon": La E-publikajxoj estas konfiskataj cxe landlimoj ktp.

Tamen, niaj prelegoj alportas rezultojn: Vicrektoroj Dordea, Cornea, Munteanu, la lingvistoj Serban, Tanase, la gxenerala inspektorino de lernejoj, Crisan, agnoskas la raciecon de la ideo, ecx subskribas kune kun Apreotesei kaj mi kolektivian memuaron por la Centra Komitato de la cxiopova partio.

En Bukaresto, sukcesa kontakto kun gekolegoj Boia, Dominte (ambau jam bone regantaj la lingvon), Prioteasa, Wald, Tepelea, Bulgar, kun la vicministro Balan (vidante la PIV-on li miras: "La afero igxas serioza"! ) La akad. Moisil, grava matematikisto, iam estis auskultinta E-lingvan prelegon de japana matematikisto kaj igxis firma adepto de Eo. Similajn spertojn faris akad. Arghezi (la plej granda rumana poeto de nia jarcento) kaj akad. Geo Bogza. Moisil akceptis farigxi honora prezidanto de la planita E-asocio, sed baldaŭ mortis. Sukcesaj kontaktoj en la universitatoj de Iasi (prof. Vraciu) kaj Cluj (asist. Paltineanu). Vizitoj en pluraj urboj por malkovri la e-istojn. Vera rikolto inter la hungaroj: I. Nagy, dro.Gabor, Zagoni, Szucs, Bilous-Nagy, Szasz, Karoly. Cxie gxoj kaj espero. Apreotesei sukcese varbadas en agronomiaj institutoj (Timisoara, Bukarest), inter medicinistoj, en la Nacia Teatro (granda aktoro, Leahu, artisto de la popolo, donos al ni plurflankan helpon). Kiel vicdekano de la Filologia Fakultato kaj gvidanto de distrikta kulturrevuo, mi havas okazon prezenti la ideon al la ingxeniero kaj scienca verkisto, Ion Iliescu, tiutempe respondeculo pri scienco, klerigado kaj kulturo en nia distrikto, poste dufoje elektita prezidento de Rumanio. Lia konkludo:

"La ideo estas gxusta, mi prenas sur min la respondecon pri gxi. Ni aperigu pri Eo artikolon en nia kulturrevuo kaj vidus kio okazos"!

Cxar ekde 1959 ecx la vorto Esperanto ne rajtis aperi en rumanaj publikajxoj, mi sendis la artikolon al la centra revuo "Contemporarul", centra revuo de la Kulturministerio kies cxefredaktoro, Mitea, estis amiko de Ceausescu (sro (Iliescu jam estis havinta konfiktojn kun la diktatoro). La artikolo aperis (!), sed "kun aparta aprobo", t.e. ke neniu jxurnalo rajtas komenti la eventon.

Vizitas nian universitaton en 1977 prof. Costea, konsilanto en altprestigxa Akademio pri Sociaj kaj Politikaj Sciencoj. Rezulto de la diskuto kun li (apude kun esperanto-lingvaj revuoj kaj kelkaj libroj): "Mi sincere konfesas, ke nur nun mi komprenas la sencon de Eo"! Apreotesei kaj mi vojaĝxas al Bukarest (poste ankoraŭ pli ol dek fojojn), vizitis la prezidanton de la menciita Akademio (Costea estis kunportinta memuaron por li), kaj aparte ni diskutis kun aliaj kvin membroj de la Prezidio. Rezulto: La Akademio decidis:

a) Eo estas gxusta kaj apogenda;

b) la Akademio prenas la sxirmadon pri koncerna scienca agado;

c) en Timisoara ekfunkciu Kolektivo pri Esperanto kaj Interlingvistiko, sen financa apogo (kvankam Ion Goliat, antaŭe rumana ambasadoro en Hispanio, esperis ricevi por ni ecx valuton).

Tiu unua oficiala aprobo de Eo en la lando permesis al ni partopreni eksterlandajn arangxojn (Boia prelegis en Varna, mi en Ahrenshoop/GDR), ok gestudentoj partoprenis seminarion en Pollando).

Ni organizis sciencajn subkolektivojn en pluraj urboj: en Bukarest la estro estis prof. Tepelea, hodiaŭ honora membro de la Scienca Akademio kaj prezidanto de kultura komisiono de la parlamento.

La Bukarestaj kolegoj tradukis en Esperanton la revuon de la Ministerio pri Sporto kaj Turismo "Ferioj en Rumanio". En la Aula Magna de la Universitato en Timisoara, la 29-an de majo 1978, okazis festa malfermo de nia agado: Partoprenis la scienca konsilantaro de la Universitato, pluaj aliaj kolegoj kaj cxirkau 30 e-istoj de la lando. Tiaj renkontigxoj farigxis jara tradicio. En 1984 partoprenis pli ol 350 personoj, kun sciencaj, literaturaj, teatraj kontribuoj. Oni gxoje konstatis ke "la rumana movado unuigxis, multe pligrandigxis, junigxis kaj precipe sciencigxis" (prof. Apreotesei).

En julio 1978 mi reprezentis nian fakultaton en ministeria komisiono faranta la estontajn universitatajn programojn.

Dum la unuaj tri tagoj mi povis diskuti aparte kun miaj gekolegoj, neniu parolanta Eon. La rezulto: Oni enkondukis Eon kiel nedevigan fakon en la filologiajn fakultatojn. La vicministro pri klerigaj Radoi menciis ke "fakte la instruado de fremdaj lingvoj nenie donas fruktojn". La gxenerala direktoro, prof. Dima, laudis nian ekspozicion kun esperantajxoj en la Universitato Timisoara. Poste ni rajtis eldoni (senprofite) lernilojn, organizi grupojn de studentoj.

En 1981 ni eksciis pri alveno de Bukaresta kvarpersona grupo de altpolitika organo "Viitorul social", kie Eo estis plurfoje atakita. Ni mobilizis niajn fortojn kaj nervojn por tiu eble decida momento. La Aula Magna estis plenplena. Partoprenis ankaŭ e-istoj el la tuta lando. La vicrektoro Luca proponis min kiel gvidanton de la debatoj. Post "memorindaj diskutoj en akademia atmosfero", prof. V. Ducelescu, gvidanto de la gasta delegacio, deklaris, (je sia honoro!): "Kamaradoj, vi konvinkis nin!". La partoprenantoj festis la momenton, longe kantante (E-lingve kaj "cxiulingve") post la vespermangxo en granda kantino de nia Universitato en Timisoara - sola altlernejo de la lando, kiu ekde 1978 arangxis sciencajn erojn en siaj oficialaj sesioj, gastigante la E-amikaron de la lando kiel "gestudentojn" (kvazau senpage), en modela amika etoso.

Gxi igxis centro de la E-movado en Rumanio. (Ni ricevis senpagan sidejon, klubejon kaj bibliotekon, moralan kaj administran apogon). Tamen la Kulturministro estis daŭre malpermesanta Eokursojn en la popolaj universitatoj, cxar ni ne sukcesis okazigi oficialan partian dokumenton favore al Eo kaj, sen tio, oni timis, cxar pluraj konataj personoj estis severe punitaj pro nura asisto al iu "transcenda meditado", veninta el eksterlando, kaj okazigintaj "duone permesatajn kunsidojn".

Konklude: Cxu "la sciencistoj ne interesigxas pri Eo"? Cxu la movado fatale antaŭenmarsxas "kun rapideco de centjara homo"? Cxu temas pri "fiflatado la potenculoj"?

Nur per partopreno de universitatanoj klarigxas la unua paradokso de la rumana movado: gxi ege progresis sub severa diktaturo kaj sen asocio, revuo, mono (cxio venis el propraj posxoj), sen dungitoj, tradicioj, kulturaj konfirmoj, internaciaj kontaktoj. Helpis al tio jenaj principoj, parte prezentitaj dum la UK en Varna: Ni enkonduku Eon en la sciencon kaj la sciencon en la tutan Eo-agadon; la internacia movado jam en pluraj landoj altiris verajn sciencistojn kaj oni ne rajtas supozi, ke nur tiuj kapablas kompreni nian ideon, dum cxiuj ceteraj estas intelektuloj sub la nivelo de ordinara e-isto. La scienco havas prestigxon antaŭ la decidpovaj forumoj, antaŭ la intelektularo kaj junularo, gxiajn argumentojn la registaroj ne povas longeglekti; sed oni trovu almenaŭ du, tri, kvar altkvalifikitajn personojn pretajn oferi tempon, forton, monon, teorie bone preparigxi en nova fako, prelegi, vojaĝi, sen neglekti la propran fakon, cxar oni ne rajtas esti "nur e-isto". Oni estis leginta iliajn librojn, oni estis auskultinta ilin en radioelsendoj kaj TV, oni respektas iliajn personecojn: ili ne povas esti "stranguloj". Komprenibile, sciencistojn oni ne konvinkas per eksterajxoj (cxemizo kun verda stelego ktp.), sed per trafaj argumentoj en larĝa perspektivo prezentitaj de kulturkreantoj.

Cxiu e-isto venis per hazardo al Eo. Kial ne "organizati la hazardon", penetrante per sciencistoj en sciencajn kaj kulturajn mediojn? Superaj instancoj (naciaj, internaciaj) ne spontane interesigxas pri demokratiaj iniciatoj. Tamen, la sciencistoj, la intelektuloj gxenerale, ofte estas "idealistoj", sentas etikan respondecon pri la sorto de validaj ideoj kaj kapablas krei entuziasmon por ili. Do, ni bezonas "vir bonus, dicendi peritus" (lat. viron moralan, kulturitan parolanton).

Tio ne estas la sola vojo progresigi la movadon, sed konfirmas gxin ankaŭ la irana kaj cxina movadoj: fortegas la unuigxo de la scienco kun la spontana internacilingva movado. Ni ne estu elitismaj, sed subtaksi la kulturajn, socie influajn faktorojn estas en la moderna mondo grava strategia eraro. Ne suficxas la racieco de ideo por doni al gxi necesan dignon. La E-rondoj plurflanke gravas, sed kutime ili ne havas la necesan prestigxon por rapide disvastigi la movadon, ofte malfacile konservas la dekomencajn membrojn kaj riskas igxi maljunula hobbio.

Niaj principoj kaj agoj certigis al ni atingojn, kiujn ne havis multaj asocioj maljunaj, oficiale agnoskitaj, ecx subvenciitaj ktp.

Nian veron atestas ankaŭ la dua paradokso de la rumana movado: gxi, nun, en libereco, stagnadas (escepte, eble, de fervojistoj au instruistoj). Tiu stagnado havis unu momenton antaŭ 1989, alian poste.

En februaro 1985 venis ordono de vicministro Ciucu pri "tuja" malpermeso de E-kursoj - sen iu ajn klarigo! En nia interdiskuto li menciis financajn kialojn, sed kiam mi proponis, ke la kursoj daŭru senpage, li faris promeson nerealignotan: "Oni arangxos debaton; vin oni invitos". Male, bukarestaj slavistoj faris negativan referajxon pri Eo kaj tio "validis" pro politikaj celoj! Do, oni bezonas scienculojn ankaŭ por detruigi!

Neniam oni invitis nin; kontraŭe, sekvis enketoj, minacoj. La dekanino Jucu informis min pri la minaco de nova rektoro eksfunkciigi min, cxar mi "damagxis per Eo al la prestigxo de la Universitato"! Tamen, mankis la kulpo: cxio, kion mi skribis, estis aperinta en oficialaj jurnaloj, leterojn al eksterlandaj radiostacioj mi ne sendis kaj mi havis la aprobon de la menciita Akademio pri Sociaj kaj Politikaj Sciencoj. Plue, mi estis dum la multjara agado plurfoje dekoraciita por mia instrua, eduka scienca laboro en- kaj eksterlanda. Cxu provoki konflikton kun la aŭtoritatoj?

Dro Detlev Blanke, kiu pasxon post pasxo sciis pri nia agado, proponis internacian helpon, sed mi konis la diktaturon: gxi ne estis korektebla, gxi povintus nur detruigi la karieron de niaj amikoj. Mi prenis sur min la tutan respondecon, ne prezentis la postulatan "liston de cxiuj e-istoj", sed mi devis subskribi dokumenton, ke "venontjare mi propravole pensiuligxos" - je la

minimuma agxo por pensiuligxo (kolegoj samagxaj funkcias gxis hodiaŭ). Kompreneble, la sciencistoj grandakavante cxisis la E-agadon, iuj ecx neis iaman partoprenon en gxi.

Gxis 1989 en Timisoara okazis nur rekontigxoj en mia logxejo. Post tiu cxi jaro revolucia, mi optimisme skribis: "Nun floras la rumana E-movado". En junio prof. Helmar Frank kaj mi, helpataj de vicministro Stamm (iama stipendiato de Frank) sukcesis skribi kaj tuj oficialigi dokumenton nuligantan la malpermeson de E-kursoj kaj eksplicite rekomendantan al cxiuj rektoratoj enkondukon de Eo en cxiujn fakultatojn de la lando kiel studobjekton nedevigan sed egalrajtan kun la aliaj lingvoj. Bedaurinde la neanstatauebla Apreotesei, forpasis en 1989. Mi reprenis la prelegseriojn en la superaj alternejoj de Timisoara: komencigxis 14 E-kursoj en nia urbo. Cxiuj en studentaj rondoj, do la intereso estas granda, sed kutime oni ne restas en la kursoj kaj movado, cxar mankas la motivado: almenau la internaciaj kontaktoj necesas, se libroj, revuoj, faka bibliografio mankas.

Por doni oficialan atestilon al necesaj instruistoj, ni organizis en julio 1990 "la unuan liberan Eo-kongreson", kiu ankaŭ devis prepari plurajn aliajn celojn. Partoprenis kaj salutis la kongreson vicprefekto de la distrikto, la rektoro, du dekanoj. Prelegis en scienca parto e-istoj el la tuta lando, sed la organiza momento (felicxe la lasta ero) fiaskis! Simile al la politika sfero aperis personaj au lokaj ambicioj de iuj e-istoj. Ni miris kaj seniluziigxis pro la kvereladoj. Pluraj kolegoj forlasis "tian movadon". La nova komitato ne plu trovis la iaman disciplinon. Tri grupoj "sendependigxis", iuj malpacigxis inter si (tamen promesante al la mondo "sanktan harmonion") kaj kvazau cxiuj poste cxesigis la agadon, kotizojn malmultaj pagis ktp. Du-jara konfuzo devis montri "kio okazos": ege malmulte.

Poste ni rekomencis la organizan laboron. Mi mem paroladis en universitatoj (kvarfoje ecx en ties senatoj): Timisoara, Sibiu, Brasov, Oradea, Craiova. La Universitatoj "Hyperion" en Craiova kaj "Tibiscus" en Timisoara deklaris sin pretaj krei oficialajn sekciojn de "Eo kaj jxurnalismo".

Miaj kontaktoj okazis tiele: "Sinjoro rektoro, vi certe konscias pri la lingvaj malfacilajxoj en internaciaj kontaktoj. Mi studis la problemon. Cxu vi konsentas, ke mi prezentu la konkludojn de la interlingvistiko en via universitato? Cxu pri Eo vi jam audis? Jen scienca libro kaj kelkaj kulturaj revuoj". Sekvis mallonga informado. Neniu rektoro, precipe post 1989, malpermesis la debaton (antaŭ 1989 iuj timis apogi Eon). Li kutime alvokis dekanon au fakestron kondukantan min en amfiteatrojn, kie mi sin teze informis la studentojn pri la ideo, pri gxiaj plurflankaj aspektoj kaj respondis demandojn. Mi atentigis ke la E-movado ankoraŭ ne havas librojn kaj revuojn kvante kompareblajn kun la nacilingvaj, ke temas pri nova ideo, kiu postulas unue gxustan komprenon kaj helpon por kreado de oficialaj strukturoj ktp. Daurigis pli-malpli kunlabori malmultaj gekolegoj - d-ro Dominte, d-ro Constantinescu, prof. Poenaru, prof. Bocsa, lekt. Butan, sed precipe niaj iamaj gestudentoj: Dobre, Bute, Hehn, Popa, Pitar kaj aliaj novaj. Tamen sep sciencistoj estis forpasintaj kaj ankaŭ pluraj malnovaj sinceraj e-istoj .

Nun iuj kolegoj laboras en eksterlando, aliaj igxis elstaraj politikistoj ("ne plu havas tempon"), aliaj maljunigxis kaj malfortigxis: Ankaŭ mi. Tamen, la Filio en Timisoara de la Asocio de Sciencistoj, kie prezidantas mia iama fervora "lernanto", la akad. Dordea, kreis en 1995 kadre de la Akademio Komisionon Esperanto kaj Interlingvistiko, kiu jam kvinfoje organizis tutlandajn simpoziojn. Oni tamen dubas, cxu la movado rapide venkos la stagnadon sen cxiam kaj cxie necesaj agentoj universitatanoj. Du postaj kongresoj estis malricxaj, eble sabotitaj de unu au alia grupo, mankis oficialuloj ktp. Sen "socie influaj homoj", kiujn postulis prof. Lee Chong- Yeong, la esperantistoj restos izolitaj grupoj kiel antaŭe. Sen ili, la ministeria aprobo de Eo-kursoj ne bone funkcias, cxar neniu zorgas pri la enkonduko de la kursoj en la programon kaj estas suficxe da kontraŭuloj, kiuj dezirus, ke Eo malaperu el la studprogramoj. Do videblas, kial krei la grupojn menciitajn de la UEA- prezidinto.

Konklude: a) Sub acxa diktaturo severe malpermesinta Esperanton, la sciencistoj, precipe la universitatanoj, komencinte kvazau de nulo, sukcesis en nur kelkaj jaroj (1979-1984) unuigi, multe pligrandigi, junigi, oficialigi la movadon en Rumanio kaj, en 1978, enkonduki Eo-kursojn en la filologiajn fakultatojn; post 1989 oni enkondukis ilin en cxiujn fakultatojn, kie troviĝis altkvalifikitaj instruistoj. Tio eblis nur tial, cxar oni donis al la ideo la necesan prestigxon kaj, sen babilo pri "desuprismo" au "desubismo", oni influis cxiujn tavolojn de la socio kaj samtempe la politikajn kaj administrajn instancojn, ne "fiflatante" ilin, sed kreante perspektivojn, kiujn ili ne povis longe kontraŭstari sen ridindigxi.

b) Oni bezonis la sciencistojn ankaŭ por detrui, en 1985, la jam kreitajn strukturojn kaj por "argumenti" la ministerian malpermeson de Eo-kursoj. Tian rolon iuj sciencistoj havis (iuj foje eble bonintence) ne nur en Rumanio (kaj ne nur rilate al Eo) kaj daŭre ili havas, se iu akirajxo ne estas matematike demonstrebla au praktike tuj videbla kaj se ties apogantoj ne trovas la taŭgajn vojojn por klare, pacience sed firme argumenti la veron.

c) Sen almenau kelkaj sciencistoj, kapablaj unuigi - kiel Zamenhof, Privat kaj pluraj aliaj - la raciecon de la ideo kun varmeco de la koro, la rumana movado stagnadas, sub iuj aspektoj ecx regresis, en libereco (post 1989).

Oni ne kulpigu pri tio nur la "financajn kondicxojn" au aliajn "objektivajn kialojn": kiel jam menciite, la konfuzo kaj malkresko komencigxis jam en 1990, okaze de la "unua libera tutlanda Eo-kongreso", tiam la "objektivaj kondicxoj" ankoru ne estis pli favoraj ol antaue. La grava rolo de la intelektularo en kulturaj fenomenoj estas legxeco.

Konkretaj sekvoj de la menciitaj faktoj: necesas elpasxoj por mobilizi niajn sciencistojn, gxenerale nian intelektularon kaj por konkeri la junularon. Pri tio - aliloke.

## 2. Esperanto kiel faklingvo: Terminologio kaj terminologiaj aktivecoj

### Elekta bibliografio

*Detlev Blanke*

#### 2.1. Enkonduko

2.1.1. Malgrau diversaj provoj gxis nun en Esperanto ne ekzistas vere sistema kaj science bazita agado por evoluigo de fakterminaroj por la diversaj faklingvoj.

Ekzistas multaj seriozaj provoj, antaŭ la unua mondmilito de Maurice Rollet d'Isle kaj Charles Verax kaj post la milito aparte de Eugen Wster - la fondinto de la terminologio-scienco - post la dua mondmilito de Rudolf Haferkorn, Jan Werner kaj Rudiger Eichholz.

Aparte menciindas la provoj de diversaj aktivuloj kiel Wera Dehler (poste Blanke) kaj Jan Pospisil komence de la 80-aj jaroj cxirkau la Terminologia Esperanto Centro de UEA (TEC), kiuj klopodis stimuli la ellaboron de metodologia bazo por terminologia agado, bazo kiu konsideru la rezultojn de la neesperanta terminologio-scienco.

Pri la celoj kaj la agado de TEC aparte informas sub 2.2. Wera Blanke (Dehler) 1985 kaj 1986. Pro la drastaj sxangxoj en orienta Europo kaj la manko de laborpretaj fakuloj la aktivadoj de TEC cxesis, espereble nur provizore.

2.1.2. La bibliografio helpu al interesitoj enlaborigxi en la problemojn. Cxar cxiam eblas lerni el la eraroj kaj sukcesoj de la antaŭuloj. Kelkaj materialoj pro tio prilumas terminologian agadon en historia perspektivo (ekz. Averbuch 1992, W. Blanke 1989b; 1997a,b).

Eble cxio cxi instigos daurigi kaj plibonigi la agadon, kiu estas de esenca signifo por la estonteco de Esperanto.

2.1.3. Mi listigis nur materialojn pri gxeneralaj problemoj de la terminologio, aparte pri terminologia laboro en kaj por Esperanto (2.2.) Tiuj temoj kompreneble estas ligitaj kun la fenomeno faklingvo kaj inverse. Pro tio en la listigitaj materialoj oni ankaŭ trovas konsiderojn pri la faklingvo gxenerale en Esperanto. Mi ne listigis terminarojn de unuopaj fakoj (ekz. matematiko, kemio ktp.), nek diskutojn pri unuopaj diversfakaj terminoj. Pri ekzistantaj terminaroj/fakvortaroj por unuopaj fakoj informas kelkaj bibliografioj (Vidu sub 2.3), kiuj bedaŭrinde ne estas aktualaj kaj bezonus gxisdatigon.

2.1.4. La bibliografio ne povas esti aktuala au kompleta. La lastajn informojn pri aperintaj fakvortaroj oni trovas en la revuo Esperanto (rubriko "Laste aperis"), siatempe ankaŭ en "Terminoteko, Informilo pri terminara laboro en Esperanto en kunlaboro kun Perkomputora Termino-Kolekto (Pekoteko)" eldonita de Bernhard Pabst (Sudweg 42, D-53773 Hennef, Germanio, Tel. +49-2242-866580), kiu tamen sxajne ne plu aperadas. Ankaŭ cxi-tiu "Informilo por Interlingvistoj" (IpI), abonebla pere de UEA, regule informas pri novaj studoj kaj fakvortaroj.

2.1.5. Cxar estas utile ne nur resti en la esperantista medio sed iom sekvi la neesperantan sciencon mondon rilate esplorojn pri la fenomeno faklingvo kaj - al tio ligitaj - terminologio-sciencajn problemojn, mi ankaŭ listigis kelkajn neesperantlingvajn materialojn. Inter ili iom multas, pro kompreneblaj kialoj, aparte germanlingvaj.

2.1.6. La bibliografio aperis unue en "Scienca Revuo", vol. 48(1997), N-ro 3(172), p. 3-14 kaj en la nuna versio estas aktualigita. Gxi ne celas kompletecon, sed klopodas menci i la plej gravajn materialojn. Mi estos tre danka, se kolegoj atentigos min pri mankoj kaj nemenciitaj gravaj etnolingvaj kaj esperantaj materialoj. Ili bv. skribi al mia adreso (Otto-Nagel-Str. 110, D-12683 Berlin, tel.+49-30-5412633, fakso +49-30-54 56 742, < blanke.gil@berlin.snafu.de >).

*D. Blanke*

## 2.2. Principoj kaj problemoj de terminologia laboro en/por Esperanto

- Averbuch, K. Ja. (1992): Terminologicxeskaja koncepcija E.K. Drezena. En: Naucxno-technicxeskaja terminologija. Moskva, Nr. 2-3, p. 15-26 (Ernest Drezen = pioniro de la sovetia terminologiscienco)
- Bednarik, Ales (1984): Bazaj principoj de Esperanta terminologio. En: Kontribuoj al lingvaj teorio kaj praktiko. Kolekto de prelegoj prezentitaj kadre de la lingvistika seminario en Nitra 1983-11-25/27. Poprad : Slovaka Esperanto-Asocio, p. 42-53
- Blanke, Detlev (1986): Esperanto und Wissenschaft. Zur Plansprachenproblematik. Berlin: Kulturbund (2-a eldono), 88p. (p.49-58 pri farado de terminoj kaj ties registrado en Esperanto)
- Blanke, Wera (1986): Multlingva mondo kaj fakvorta normigado. En: Esperanto, (Rotterdam) 79(1986)12, p. 207-208
- Blanke, Wera (1987a): Kion ni faru? Survoje al realigo de Terminologia Esperanto-Centro (TEC).En: esperanto (Rotterdam), 80(1987)5 (majo), p. 88-90
- Blanke, Wera (1987b): Planovojazykove korene medzinardnej terminologickej normalizacie a jej vplyv na esperanto. En: Kosecky, Stanislav (1987,red.): Problemy interlingvistiky. Zbornik materialov z interlingvistickeho seminara (Vysoke Tatry 20.-22. maja 1987), Bratislava: Slovaka Esperanto-Asocio, p. 130-139
- Blanke,Wera (1989a): Terminologia Esperanto-Centro. Efforts for Terminological Standardization in the Planned Language. En: Maxwell, Dan/ Schubert, Klaus / Witkam, A.T.M. (1989, Eds.): New Directions in Machine Translation. Conference Proceedings. Budapest 18/19-8-1988. Dordrecht-Providence: Foris, p. 183-194
- Blanke, Wera (1989b): Terminological standardization - its roots and fruits in planned languages. En: Schubert 1989, p. 277-292
- Blanke, Wera (1995): Fakvortoj en Esperanto - kion fari, se la vortaro ne plu helpas ? En: Esperanto-Dokumentoj 2, Osnabruck: Deutsches Esperanto-Institut, p. 22-33
- Blanke, Wera (1997a): Uber den Beitrag von Interlinguisten zur Organisation internationaler Terminologiearbeit. En: Becker, Ulrich (Red.): Terminologiewissenschaftliche Aspekte der Interlinguistik. Beitrage gehalten auf der 6. jahrestagung der Gesellschaft fur Interlinguistik, 15.-17.November 1996 in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 2, p.4-12
- Blanke, Wera (1997b): Terminologiaj principoj kaj ilia normigo - kelkaj aspektoj. in memoriam Paul Neergaard. En: Koutny, Ilona/Kovacs, Marta (1997, Red.): Strukturo kaj socilingvistika esploro de Esperanto, Budapest: Steleto/ILEI, p. 117-125
- Blanke Wera/Blanke, Detlev (1998): Plansprachen als Fachsprachen. En: Hoffmann, Lothar/Kalverkmper, Hartwig/Wiegand, Herbert Ernst (1998,eld.): Fachsprachen. Languages for Special Purposes. 1. Halbband (Ein internationales Handbuch zur Fachsprachenforschung und Terminologiewissenschaft. An International Handbook of Special-Language and Terminology Research). Berlin-New York: de Gruyter, p. 875-880
- Bormann, Werner (1993): Fakvortoj en ekonomio, la faklingvo en Esperanto, la Terminologia Centro de UEA kaj la Akademio de Esperanto. En: La Letero de l'Akademio de Esperanto (Paris) n-ro 23 (Aprilo-Majo-Junio) 1993, p. 3-4
- Bormann, Werner (1994):La faklingvo en Esperanto.En: esperanto 87(1994)6 (junio), p.100-101 (reproso en Heroldo de Esperanto 70(1994)7, p.3-4; La Letero de l'Akademio de Esperanto, No. 25 [Januaro-Februaro-Marto], p.3-5; Eventoj No.56 [2/junio 1994], p.3)
- Bormann, Werner (1995): Defio faklingvo. En: Chrdle 1995, p. 57-71
- Buza, Bernao (1982): La Zamenhova spirito de la vortkreado. En: Novobilsky, Vlastimil/Pluhar, Zdenek (Red.): Kolekto de la referajxoj el la internacia Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Teniko 1982. Ceske Budejovice 1982-08-13/15, Praha: Cxehxa Esperanto-Asocio, p. 86-90
- Carlevaro, Tazio (1974): Scienca, popularscienca kaj faka literaturo. En: Lapenna/Lins/Carlevaro 1974, p. 249-279
- Carlevaro, Tazio (1974): Fakaj terminaroj. En: Lapenna /Lins/Carlevaro 1974, p. 280-292
- Carlevaro, Tazio (1974): Fakaj periodajxoj. En: Lapenna/Lins/Carlevaro 1974, p. 304-310

- Chrdle, Petr (Red.,1995): La Stato kaj Estonteco de la Internacia Lingvo Esperanto. Dobichovice: KAVA-PECH, 191 p.
- Darbellay, Christian (1981): Kiu estas kiu en scienco kaj tekniko. Neuss: La aŭtoro, 275 p.
- Dehler, Wera (1982): 6 tezoj pri terminologia laboro. En: der esperantist (Berlin) 18(1982)2(112), p.38
- Dehler, Wera (1982): Proponoj por terminologia laboro. En: der esperantist (Berlin) 18(1982)2(112), p.38-39
- Dehler, Wera (1984): Terminologio internacia - radikoj, tendencoj kaj rilatoj al Esperanto. En Pluhar, Zdenek/ Novobilsky, Vlastimil (Red.): Kolekto de la referaĵoj el la internacia seminario Apliko de Esperanto en Scienco kaj Teniko. Brno: Cxehxa Esperanto-Asocio, p. 99-105
- Dehler, Wera (1985a): Rilatoj inter planlingvoj kaj internacia terminologinormigo. In memoriam Hans Joachim Plehn. En: Paco (GDR-eldono,Berlin, 1985) p. 33-36 Same en: Rokicki, Ryszard (1989, Red.): Acta Interlingvistica.13-a Interlingvistika Simpozio.Varsovio: Akademickie Centrum Interlingwistyczne. Rada Naczelna ZSP, p. 35-46
- Dehler, Wera (1985b): Terminologiaj principoj de Esperanto. En: der esperantist (Berlin) 21(1985)4(132), p. 83-89
- Dehler, Wera (1985c): Nova sxanco por terminologio. En: Planlingvistiko (La Chaux-de-Fonds) 4(1985) N-ro 16 (vintro), p. 18-20; represo i.a. en: Budapesxta Informilo (Budapest) 12/85, p. 17-20; der esperantist (Berlin) 1/1986, p. 1-4; Heroldo de Esperanto (Bruselo) 3/1986,p.3 (mallongigite); El Popola Cxinio (Pekino) 8/1986, p.10-12; Bulgara Esperantisto (Sofio) 9/1986, p. 8-11; Pola esperantisto (Varsovio) 1/1986, p.13-16; Oomoto (Kameoka-si) 1/1987, p. 28-31; Starto (Praha) 4/1987, p. 7-11 Dehler, Wera (1986): Faka apliko kaj terminologio en Esperanto. Cxu hobio au seriozajxo? En: esperanto (Rotterdam) 79 (1986) 5, p. 83-85
- Dellian, Kurt (1955): Principoj de Terminara Kreado. En: Sennacieca Revuo (Paris), n-ro 83, 1955, p. 54-56
- Dellian, Kurt (1957): Pri la evoluo de esperantaj terminaroj. En: Scienca Revuo (Purmerend) 8(1957)3(31), p. 88-91
- Drezen, Ernest K. (1935): Pri problemo de internaciigo de science-teknika terminaro. Moskvo: Standardizacija i Racionalizacija, Amsterdam: EKRELO, 83 p. (reprezo: 1983, Saarbruken: Iltis, kun postparolo de Alfred Warner)
- Eichholz, Rudiger (1968): Slipara Vortaro. Klarigoj, signoj, mallongigoj kaj aldonajxoj. Cardiff (Kanado): esperanto press
- Eichholz, Rudiger (1975): Provizora labor-plano. Bailieboro: esperanto-press
- Eichholz, Rudiger (1986a): Perkomputora terminokolekto (Pekoteko). En: Eichholz, Rudiger (Red.): Akademiaj Studoj 1986. Bailieboro (Ontario): esperanto press, p. 111-130
- Eichholz, Rudiger (1986b): Terminologia Vortaro. Provtraduko de la Rekomendo R1087 de ISO (1969). Bailieboro (Ont.): esperanto press, 50 p.
- Eichholz, Rudiger (1987a): Terminiko en la interetna lingvo. En: Eichholz, Rudiger,(1987, Red.): Akademiaj Studoj 1987, Bailieboro (Ont.): esperanto press, p. 97-105
- Eichholz, Rudiger (1987b): Pekoteko - a promising new method for terminology. En: TermNet News (Wien) 16/1987, p. 3-8
- Eichholz, Rudiger (1988): The creation of technical terms in Esperanto. En: Czap, Hans/ Galinski, Christian (1988, Eds): Terminology and knowledge engineering. Supplement. Frankfurt/M.: Indeks, p. 93-97
- Eichholz, Rudiger (1989): Terminics in the interethnic language. En: Schubert 1989, p. 293-309
- Eichholz, Rudiger (1991): Esperanta provtraduko de International Standard ISO 1087 (ISO 1990), Terminology Principles and co-ordination. Manuskripto, 20p.
- Eichholz, Rudiger (1992): Perkomputora terminokolekto (Pekoteko) 85-90, Vol.I-III, Bailieboro (Ont.): esperanto press, 1815 p.
- Eichholz, Rudiger (1995): Principoj por selekto de fakaj terminoj. En: Chrdle 1995, p. 72-88

- Favre, Alain (1998): Esperanto et sciences naturelles. En: Carlevaro, Tazio(Red.): Domains de la recherche en linguistique appliquée. Deuxième Colloque d'Interlinguistique: CDELI. La Chaux-de-Fonds. Contributions. Bellinzona: Hans Dubois, p.114-138
- Fellmann, Ulrich (1997): Selbstbildungsfähigkeit und Bernahme von "Internationalismen": Parallelen in der Terminologienproblematik im Deutschen und im Esperanto. En: Becker, Ulrich (Red.): Terminologiewissenschaftliche Aspekte der Interlinguistik. Beiträge gehalten auf der 6. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik, 15.-17. November 1996 in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 2., p. 16-28
- Fiedler, Sabine (1995): Fachkommunikation in Plansprache und Ethnosprache. En: Henrici, Gert/Zofgen, Ekkehard (Red.): Fremdsprachen lehren und lernen. 24, p.182-196
- Fiedler, Sabine (1996): Norvega rato oder migra rato ? Zu Fachwörtern mit onymischer Konstituente in Esperanto. En: Glaser, Rosemarie (Red.): Eigennamen in der Fachkommunikation (Leipziger Fachsprachen-Studien, Bd. 12), Frankfurt a.M. et al.: Peter Lang, p. 121-130
- Frank, Tilo (1992): Internacia Sciencista Dokumentaro. San Marino: AIS, 240 p.
- Fritsch, Ludvik (1979): Teknikaj vortaroj en Esperanto - problemoj de la fakterminologio en Esperanto. En: Blanke, Detlev (Red.1979): La internacia lingvo. Sciencaj aspektoj. Berlin: Kulturbund, p. 193-199
- Galinski, Christian/ Budin, Gerhard/ Krommer-Benz, Magdalena/Manu, Adrian (1994): Internacia kunlaboro en la terminologio-planado. En: Scienca Revuo 45, n-ro 1(264), p. 18-27
- Haferkorn, Rudolf (1955): Universala Dekuma Klasado kaj Terminologio. En: Scienca Revuo (Purmerend) 7(1955)2(26), p. 58-61
- Haferkorn, Rudolf (1956): La intersimiligo de naciaj fakterminoj en la teknika komitato ISO/TC37 "Terminologio". En: Scienca Revuo (Purmerend) 8(1956)1(29), p. 31-34
- Haferkorn, Rudolf (1959): Internacia lingvonormigo en scienco kaj tekniko. Esperanto au Interlingua? En: Scienca Revuo (Purmerend) 10(1959)4(40), p. 146-150
- Haferkorn, Rudolf (1965): Kion niaj fakvortaristoj devas atenti? En: Scienca Revuo (Zagreb) 15(1965)1-2(57-58), p. 7-22
- Haszpra, Otto (1979): Spertoj kaj proponoj pri la aplikado de Esperanto en la sciencoj kaj fakoj. En: Blanke, Detlev (Red., 1979): La internacia lingvo. Sciencaj aspektoj. Berlin: Kulturbund, p. 178-186
- Haszpra, Otto (1982): Lastatempa stato kaj evolutendencoj de la aplikado de Esperanto en la sciencoj kaj fakoj fine de 1981. En: der esperantist (Berlin) 18(1982)3-4(113-114) p. 60-62, 5-6(115-116) p.107-109
- Haszpra, Otto/ Felso, Geza/ Blanke, Detlev (1988): Esperanto, lingvo de la natursciencoj kaj tekniko 1887-1986. (Esperanto-Dokumentoj 25 E), Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 16 p.
- Haszpra, Otto/ Felso, Geza/ Blanke, Detlev (1989): Esperanto - langue des sciences et techniques 1887-1986. Bref aperçu traduit par F. Lo Jacomo. En: Esperanto Actualités. Revue française d'esperanto (Paris) 5/1989(404), septembre, p. 3-20
- Lang, Anneliese (1987): Bibliografio de libroj kaj artikoloj verkitaj de Eugen Wuster en au pri Esperanto (au aliaj interlingvoj). En: Wuster, Eugen: Esperantologiaj Studoj. Memorkolekto editorita de Reinhard Haupenthal. Antwerpen-La Laguna: Stafeto TK, p. 219-238
- Lapenna, Ivo/ Lins, Ulrich/ Carlevaro, Tazio (1974): Esperanto en perspektivo. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 844 p.
- Lewin, Maurice (1965): Kontribuo al logika scienca terminaro. En: Scienca Revuo (Zagreb) 15(1965)3-4(59-60), p. 71-78
- Lewin, Ralph A./ Jordan, David K. (1981): The Predominance of English and the Potential use of Esperanto for Abstracts of Scientific Articles. En: Kageyama, K./ Nakamura, K./ Oshima, T./ Uchida, T.(Eds.): Science and scientists. Essays by Biochemists, Biologists and Chemists. Tokyo-Dordrecht-Boston-London, p.433-441



- Malovec, Miroslav (1984): ISO - modelo por nia nroga laboro. En: Pluhar, Zdenk/ Novobilsky, Vlastimil (Red.1984): Kolekto de la referajtoj el la internacia seminario Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko 1984. Brno: Cxehxa Esperanto-Asocio, p. 107-111
- Neergaard, Paul (1933): Fremdvortoj en Esperanto. Parizo: SAT, 64 p.
- Neergaard, Paul (1955): Rimarkoj pri kelkaj terminologiaj principoj. En: Scienca Revuo (Purmerend) 7(1955)2(26), p. 43-57
- Neergaard, Paul (1987): Plantnomoj en la Lingvo Internacia. En : Serta gratulatoria in honorem Juan Rgulo. Vol. II. Esperantismo. La Laguna: Universidad de La Laguna, p. 485-501 (ankau baze pri terminologiaj principoj)
- Niemann, Willi Bruno (1933): Dezimalklassifikation und Weltsprache. Berlin: Kiepert, 96 p.
- Novobilsky, Vlastimil (1987): Vyuziti Esperanta ve vede a technice. En: Kosecky, Stanislav (Red.): Problemy interlingvistiky. Zbornik materialov z interlingvistickeho seminara (Vysoke Tatry 20.-22.maja 1987). Bratislava: Slovaka Esperanto-Asocio, p. 123-129
- Plehn, Hans-Joachim (1981): Infoterm - la lasta kreaĵo de prof-ro Wuster. En: Bednarik, Ales (Red.): Apliko de Esperanto en Scienco kaj Teniko. Kolekto de la referajtoj de konferenco okazinta 1981 09 14/17 en Zilina, CxSSR. Unua volumo. Poprad: Slovaka Esperanto-Asocio, p. 21-26
- Plehn, Hans-Joachim (1982): Planlingvo - cxu filologia artaĵo au teknika instrumento? En: Novobilsky, Vlastimil/ Pluhar, Zdenik (Red.): Kolekto de la referajtoj el la internacia Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko 1982, Ceske Budejovice 1982-08-13/15. Praha: Cxehxa Esperanto-Asocio 1982, p. 75-79
- Rollet de l'Isle, Maurice (1911): Konsilaro por la farado de la sciencaj kaj teknikaj vortoj. Kotschenbroda-Dresden: Thalwitzer, 78 p.
- Schremser-Seipelt, Ulrike (1990): Das Projekt "internationaler Terminologie-Schlssel" von Eugen Wuster. (Doktoriga disertacio) Wien: Geisteswiss. Fakultt der Universitt Wien, (manuskripto), 257p.+ nenumeritaj aldonajtoj
- Schubert, Klaus (1989, Ed.): Interlinguistics. Aspects of the Science of Planned Languages. Berlin-New York: Mouton de Gruyter, 348 p.
- Simon, Karl-Herrmann (1990): Al la raciigo de terminologia kaj vortara laboroj. En: AEST '88. Raciigo en Scienco kaj Tekniko. Poprad: Slovaka Esperanto-Asocio 1990, p. 136-140
- Simon, Karl-Herrmann/ Ullrich, Ingward/ Weckwerth, Horst (1998): 'Lexicon silvestre.Leksikono kaj Vortaro kun Novaj Spertoj. En: Scienca Revuo, vol. 49, N-ro 1, p. 11-17
- Smet de, Wim M.A. (1988): L'Evolution internationale de la terminologie En: Rosseel, Eddy/ Symoens, Edward (Red.): La intereso kaj utilo de komuna interlingvo. The Relevance of a Common Intermediate Language. (AIMAV Collection d' "tudes linguistiques" 36). Gent: AIMAV p. 27-31
- Spiegel, Heinz-Rudi (1985): Aufgaben, Probleme und Organisation der Terminologienormung. En. Die Neueren Sprachen, 84, Nr. 6, p. 636-651
- Stp-Bowitz, Carl (1987): Fakaj terminoj kaj vortstrukturo de Esperanto. En: Mattos, Geraldo (Red.): Centjara Esperanto. Jubilea Libro de Akademianoj. Chapeco-SC (Brazilio), p. 230-235
- Suonuuti, Heidi (1998): Terminologia gvidilo. (El la angla tradukis Sabine Fiedler. Redaktis Wera Blanke). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 38 p.
- Verax, Charles (1911/12): Propono por Terminologiaj Fundamentaj Principoj por la Scienca Lingvo en Esperanto. En: Oficiala Gazeto Esperantista (Paris) 4. junio 1911 - majo 1912, p. 378-382
- Vul'fovic, Leo (1986): Nauno-technieskie slovari na jazyke esperanto. En: Vsesojuznaja konferencija. Podgotovka i ispol'zovanie naunotechnieskich slovarej v sisteme informacionnogo obespeenija. Moskva: Nauka, p. 41-43

Werner, Jan (1980): Faklingvaj principoj kaj Teniko 1980. Usti nad Labem 1980-08-29/31. Praha: Cxehxa Esperanto-Asocio, p. 56-62

Werner, Jan (1982): Esperanta terminaro de terminologia fako. Praha: Cxehxa Esperanto-Asocio, 14 p.

Werner, Jan (1983): Terminologiaj instigoj el Bad Saarow. En: Budapesxta Informilo, vol. 14, N-ro 2 (Februaro), p. 13-15, N-ro 3 (Marto), p. 11-14

Werner, Jan (1985): Stabiligo kaj normigo de terminaro. En: Kosecky, Stanislav (1985,Red.): Kontribuo al lingva teorio kaj praktiko. III. Kolekto de prelegoj prezentitaj kadre de la 5-a lingvistika seminario en Nitra 1984-09-21/23. Poprad: Slovaka Esperanto-Asocio, p. 18-25

Werner, Jan (1986a): Signifo kaj senco de la vorto en terminologio. En: Koeck, Stanislav (1986, Red.): Kontribuo al lingvaj teorio kaj praktiko. IV.Kolekto de prelegoj prezentitaj kadre de la 6-a lingvistika seminario en Nitra 1986-06-13/15. Poprad: Slovaka Esperanto-Asocio, p. 97-104

Werner, Jan (1986b): Terminologia Kurso. Roudnice: Sdruen ZK ROH, 88 p.

Werner, Jan (1990): Dangxero de pragmata sperto en terminologio de planlingvo. En: AEST '88. Raciigo en Scienco kaj Teniko. Poprad: Slovaka Esperanto-Asocio p. 123-126

Werner, Jan (1992): Individua kaj kolektiva laboroj pri terminaroj. En: Starto (Praha) 4/1992(151), p. 4-6

Wster, Eugen (1921): Die Bedeutung der Welthilfssprache Esperanto fur den Techniker, ihr Wesen und ihre Ausbreitung seit dem Weltkriege. En: Die Technische Hochschule 3(1921)14(1.Juli), p. 210-218

Wster, Eugen (1931): Internationale Sprachnormung in der Technik. Besonders in der Elektrotechnik. Berlin: VDI, 431 p. (Du pluaj represoj kun kompletigaj cxapitroj. Bonn: Bouvier, 1966, 1970)

Wuster, Eugen (1934): Grundzuge der Sprachnormung. Berlin: VDI, 92 p.

Wuster, Eugen (1935): Mezdunarodnaja standardizacija jazyka v technike. Moskva: standartgiz, 302 p.

Wuster, Eugen (1936): Konturoj de la lingvonormigo en la tekniko. Budapest: Literatura Mondo, 130 p. (Represo 1975: Kopenhago: Dansk Esperanto-Forlag, kun postparolo de Alfred Warner)

Wuster, Eugen (1971): Internacia terminologio en la servo de la informatiko.(Inaugura parolado por la Internacia Somera Universitato, Vieno 1970). En. Scienca Revuo 22, N-ro1(87), p. 3-10

Wuster, Eugen (1978): Esperantologiaj Studoj. Memorkolekto editorita de Reinhard Haupenthal. Antwerpen-La Laguna: Stafeto TK, 254 p.

### **2.3. Bibliografioj pri fakvortaroj**

Haferkorn, Rudolf (1954): Teknikaj kaj sciencaj terminaroj en Esperanto. En: Scienca Revuo (Purmerend) 6(1954)2(22), p. 42-52

Haferkorn, Rudolf (1962): Sciencaj, teknikaj kaj ceteraj fakvortaroj en Esperanto. En: Scienca Revuo (Zagreb) 12(1962)3-4(47-48), p. 111-128

Haferkorn, Rudolf (1966): Suplementa indekso de la sciencaj, teknikaj kaj ceteraj fakvortaroj en Esperanto. En: Scienca Revuo (Zagreb) 16(1966)3-4(63-64), p. 131-134

Haupenthal, Reinhard (1991): Lexikographie der Plansprachen. En: HSK 5.3. Worterbucher. Dictionaries. Dictionnaires. Ein internationales Handbuch zur Lexikographie. An International Encyclopedia of Lexicography. Encyclopedie internationale de lexicographie. Ed. by Franz Josef Hausmann/ Oskar Reichmann/ Herbert Ernst Wiegand/ Ladislav Zgusta. Dritter Teilband. Third Volume. Berlin-New York: De Gruyter, p. 3120-3137

Ockey, Edward (1982): A Bibliography of Esperanto Dictionaries. Banstead:La auro, 238 p.

## 2.4. La faka lingvo kaj gxenerala terminologio - teorio kaj praktiko (specimenoj)

Arntz, Reiner/Picht, Heribert (1995): Einfhruung in die Terminologiearbeit. 3.Aufl. Hildesheim-Zrich-New York: Olms, 344p.

Felber, Helmut/Lang, Friedrich/Wersig, Gernot (Hrsg.,1979): Terminologie als angewandte Sprachwissenschaft. Gedenkschrift fr Univ.-Prof.Dr.Eugen Wuster. Mnchen-New York-London-Paris: Saur, 272 p.

Felber, Helmut/Budin, Gerhard. (1989): Terminologie in Theorie und Praxis. Tbingen: Narr (Forum fr Fachsprachen-Forschung, Bd.9), 315 p.

Fluck,Hans R. (1991): Fachsprachen. Einfuhrung und Bibliographie, Tbingen: Francke, 291 p.

Galinski, Christian/ Budin, Gerhard/Krommer-Benz, Magdalena/Manu, Adrian(1994): Internacia kunlaboro en la terminologio-planado. En: Scienca Revuo 45(1994)1 (164),p.18-27

Hoffmann, Lothar (1984): Kommunikationsmittel Fachsprache (2-a forte prilab. eldono), Berlin: Akademie-Verlag, 307 p.

Nedobity, Wolfgang (Ed.,1982): Terminologies for the Eighties. With a special section: 10 years of Infoterm. Munchen-New York-London-Paris: Saur (Infoterm Series 7), 412 p.

Wuster, Eugen (1991): Einfhruung in die Allgemeine Terminologielehre und Terminologische Lexikographie. Mit einem Vorwort von Richard Baum. 3-a eldono. Bonn: Romanistischer Verlag, 239 p.

---

## 3. Terminologia gvidilo - unika helpilo por terminologoj

SUONUUTI, Heidi (1998): *Terminologia gvidilo*. (El la angla tradukis Sabine Fiedler. Redaktis Wera Blanke). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 38 p.

### 3.1. La enhavo:

### 3.2. El la antaularoloj

La autorino enkonduke skribas i.a.:

"Cxiuj personoj, kiuj okupigxas pri la kompilado de terminaro, devas scii au trovi solvon al kelkaj demandoj antau ol ili povas komenci la efektivan laboron. Kie oni komencu, kie oni trovu fidindajn informfontojn kaj kiujn informojn oni kolektu? Kiel oni ordigu kaj registru la informojn kaj kiam komputilo farigxas utila? Kiel oni tenu la diversajn lingvojn apartaj, skribu la difinojn kaj organizu la tutan procedon? Tiuj demandoj cxiam ekestas, kiam terminologia projekto estas lanxita. Pro tio utilas apliki pretajn respondojn, kiuj estis elprovitaj kaj testitaj en praktiko... Aliaj, malpli oftaj demandoj rilatas la kvaliton de la vortaro. Foje la kvalito montrigxas nur en pli malfruaj fazoj de la terminologia projekto au post la publikigo de la terminaro. Tamen, ecx se la kolektajxo de terminoj bazigxas sur la plej bonaj fontoj haveblaj, gxi ne estu publikigata kia gxi estas. La plej grava signo de la kvalito de terminaro estas ties interna kohereco, kio inkluzivas klarajn kaj nekontraudirajn rilatojn inter la nocioj, difinoj kaj terminoj. Tiu kohereco povas esti atingata nur per lausistema prilaborado de la materialo.

La celo de tiu cxi verko estas prezenti koncizan gvidilon al la principoj kaj metodoj de sistema terminologia laboro kaj montri kiamaniere tiuj aplikeblas en praktiko...

La unua impresado pri lausistema terminologia laboro povus esti ke, kvankam gxi sendube plialtigas kvaliton, la metodo sxajnas esti multe tro komplika, temporaba kaj multekosta por esti aplikata. Fakte, tio ne gxustas. Denove, longa sperto kaj statistikaj pruvoj el pli fruaj projektoj montris ke, post la komenca etapo de lernado, la aplikado de terminologiaj metodoj vere plirapidigas la laborprocedon kaj rimarkinde malgrandigas la kostojn".

Lau la peto de la redaktorino Wera Blanke la autorino donis kelkajn informojn pri si mem:

"La terminologoj ofte estas, ne tro serioze, dividitaj en du kategoriojn: la sciencistoj kaj la metiistoj. Mi apartenas al la lastaj.

Mia profesia fono estas kemia ingxenierado. Mi studis kaj doktorigxis cxe la Teknika Universitato Helsinki. Dum 15 jaroj mi laboris en la Finna Esplorinstituto pri Pulpo kaj Papero, cxefe por internacia normigo de testmetodoj por pulpo kaj papero, i.a. kiel sekretario de unu el la subkomitatoj de la Internacia Organizajxo por Normigo, la Teknika Komitato por paperindustrio, ISO/TC6. Unu el miaj devoj ankaŭ estis, agi kiel sekretario de la terminologia komitato de la Finna Asocio de Paper-Ingxenieroj kun la tasko, produkti paper-terminaron (publikigita 1975). Klopodante ekscii kiel preparigxu terminaro, mi trovis la normojn de ISO/TC37. Ili estis nekompreneblaj por ingxeniero kaj mi devis legi pli pri Wster kaj liaj ideoj kaj tiel terminologio farigxis unu el miaj hobiaj.

La Finna Centro por Terminologio (Tekniikan Sanastokeskus, TSK) kreigxis 1974 kaj en 1978 oni ofertis al mi la postenon de managxero. La kolegoj cxe la Terminologia Centro kaj mi devigis nin, plene absorbi la terminologiajn principojn, por evoluigi diagram-teknikon kaj metodologion de projekto-managxado, kiuj povas esti aplikataj en la praktika kunlaboro kun fakaj specialistoj. Miaopinie tiuj temoj estis ne sufcie traktitaj en la terminologia literaturo. 1988 la rezultoj estis publikigitaj kiel manlibro de terminologia laboro (256 p. en la finna).

1994 mi pensiigxis. Dum du tri-jaraj periodoj (1992-94 kaj 1995-97) mi estis elektita prezidantino de ISO/TC37."

Do evidentas, ke verkis la gvidilon persono, kiu ne nur estas internacie renoma fakulino pri terminologiaj demandoj sed ankaŭ tre bone konas la praktikan flankon.

---

## 4. Arangxoj

*Vera Barandovska-Frank*

### 4.1. La 9-a kongreso de "Academia Latinitati Fovendae" kaj la viva Latina

La Latina, sendube internacia lingvo, estas jam dum jardekoj instruata nenature, kiel nura pasiva instrumento por kompreni skribajn tekstojn. Cxar gxi ankoraŭ cxiam taugas precipe kiel scienca lingvo, la streboj revivigi gxian parolan formon, venis unue de sciencistoj. La novlatinista kongreso en 1956 en Avignon konstatis, ke la lingvo precipe bezonas vortprovizon korespondantan al nuntempaj bezonoj kaj unuecan prononcon, kaj ke devas ekzisti koncerna parolantaro.

Tiuj cxi postuloj nuntempe estas plenumitaj: inter diversaj vortaroj kaj terminaroj elstaras "Lexicon Latinitatis Recentis"; unueciga "pronuntiatio restituta" estas uzata en granda parto de Europo. Dekoj da societoj, rondetoj, kluboj, asocioj kaj similaj grupoj zorgas pri la aktiva instruado kaj uzado de la Latina. La plej grava inter ili, "Academia Latinitati Fovendae", festis cxijare sian tridekjarigxon dum la 9-a kongreso en Jyvaskyla (Finnlando).

250 kongresanoj el kvar kontinentoj pritraktis tri temarojn: historiajn kontaktojn de la latina kaj skandinavia teritorioj, lingvoinstruadon kaj raportojn pri novlatinaj aktivecoj en la mondo. La ununura kongreslingvo estis, kompreneble, la Latina. Paralelo al la Esperanto-movado kaj gxiaj kongresoj videblas ankaŭ en kadraj programeroj (koncertoj, teatraĵoj, diservoj, komentataj ekskursoj), kie krom la originala kreaĵo audigxis tradukoj el naciaj lingvoj, ekz. en la koncerto de "musica jazzica" au en "Kalevala Latina". Menciindas latinlingvaj elsendoj de la finna radio, kiujn preparas latinistoj el Jyvaskyla.

### 4.2. Eurolingvistika arangxo en Paderborn

Gxi okazis enkadre de la tradicia "novembra renkontigxo" en la paderborna universitato 21. - 23. 11. 1997. La gxenerala temo de la renkontigxo estis "Klerigo kaj komunikado por Europo". La cxefa tasko estis laeble starigi difinon, enhavon kaj studadplanon de la prieuropa scienco, ecx trovi taugan nomon por gxi (cxu euologio, europistiko, prieuropaj studoj ktp.). La koncerna studobjekto jam ekzistas en pluraj europaj universitatoj, kutime sub la nomo "European Studies" kun diversaj enhavoj, precipe ekonomiaj kaj sxtat-juraj, cxar tiuj ja gravas por Europo. La priorecon de ekonomia flanko korespondanta al ekstereuropaj modeloj (memkompreneble cxefe al la usona) klarigis dum sia prelego i. a. Prof. D-ro Fuhrmann. La lingvopolitikan flankon oni apenau opinias interesa, cxar la komuna europa lingvo ja estas la angla.

Malgrau tia malkuragxiga enkonduko, dudeke da lingvistoj tamen klopodis montri la gravecon de lingva edukado por Europo kaj starigi studenhavon de specife prieuropa lingvistiko, do ia "eurolingvistiko". Ke tio ne estas facila, montrigxis jam en la prelego de d-rino Barandovsk-Frank, montranta, ke ne eblas objektivite difini "europajn" lingvojn. La konvenciaj geografiaj limoj de Europo ja apenau validas por lingvoj (ekz. milionoj da ruslingvanoj logxas en Azio, male unu el mongolaj kaj unu el semidaj lingvoj geografie estas europaj, en Ameriko kaj Australio regas hindeuropaj lingvoj ktp.).

Monica Pinotti montris en sia prelego, ke la semantikaj enhavoj de nuntempe modernegaj vortoj, kiel harmoniigo (Harmonisierung), malcentra kompetenteco (Subsidiaritat) au interkonsentado (Vereinbarung) estas en europaj lingvoj diverse interpretataj. Krome sxi prezentis instrumodelon surbaze de lingvokomparado, lau kiu infanoj povus lerni plurajn lingvojn samtempe. Similan ideon de plurlingva instruado havis ankaŭ d-ro Dusan Uzak el la slovakia Universitato Nitra. Prezentigxis krome la projekto de plurlingva internacia liceo en Slovenj Gradec (Slovenio).

La dua prelegbloko prezentis eblajn neutralajn tuteuropajn lingvojn: la latinan au planlingvon. Prof. Dr. Andreas Fritsch, respektata novlatinista pedagogo, preparis elektliston de la literaturo pri la latina kiel internacia lingvo, kaj montris en sia prelego, kiomgrade la latinaj lingvo kaj kulturo enfiltrigxis en europajn lingvojn. La latina ankoraŭ validas kiel referenclingvo, ekz. la cxijara eldono de la katekismo enhavas aron da modernaj terminoj. S-ro Marius Aleksa, prezidanto de la novlatinista societo "LVPA", prezentis sur ties ekzemplo, kiel funkcias la novlatinista movado. Planlingvojn reprezentis la germana delegito de la Unione Mondial pro Interlingua, Peter Liebig, kaj la prezidinto de la Akademio de Esperanto, d-ro Werner Bormann.

La programon fermis duhora diskuto pri la tauga komunikadlingvo por Europo. La kvar menciitaj solvoj (la angla, la multlingveco, la latina, planlingvo) estis detale pridiskutataj, precipe lige al la fenomeno de europa identeco, kiun prezentis la cxefo de "Interkulturo Maribor", Zlatko Tialjar. Interalie montrigxis, ke europanoj gxenerale ne rifuzas la superregadon de la angla lingvo; sekve la prognozo, ke Europo igxos iaspeca usona kolonio kaj la naciaj lingvoj igxos lokaj dialektoj, nenium principe maltrankviligas. El tio konkludigxas bezono eduki europajn civitanojn al memkonscio, cxu per reliefigo de iliaj kulturaj kaj lingvaj tradicioj, cxu per konatigxo kun iliaj etnolingvoj, cxu per neutrala komuna interkomprenigxlingvo.

Kompilado de ia europa lingvistika lernolibro sekve restas daŭra tasko, pri kiu oni denove diskutos dum la sekva konferenco, okazonta jam 15. -23. de februaro 1998. La prelegojn jam promesis Prof. Dr. Gyula Decsy (pri la europa lingvostrukturo) kaj Prof. Dr. Harald Weydt (pri la lingvopolitiko de europaj institucioj). Interesitoj pri la februara konferenco bv. aligxi kaj proponi siajn temojn cxe: Dipl.-Pd. Gunter Lobin, FB 2, Universitat Paderborn, Warburgerstr. 100, 33098 Paderborn, Tel. ++49 5251 602 919, Fax ++49 5251 480 542

---

## 5. Forpasis grava interlingvisto: W. J. A. Manders (1910-1998)

La 17-an de januaro 1998 forpasis la eminenta interlingvisto Wilhelmus Johannes Arnoldus Manders, nederlandano. Li konatigxis precipe per sia interlingvistika kompara disertacio pri "kvin artefaritaj lingvoj", 1947. La plej gravaj publicajxoj:

- *Vijf Kunsttalen. Vergelijkend onderzoek naar de waarde von het Volapuk, Esperanto, Ido, Occidental en Novial*. Diss., J. Purmerend: Muusses, 386 p., 1947

- *Interlingvistiko kaj esperantologio*. Purmerend: J. Muusses, 77 p., 1950

Krome kelkaj artikoloj:

- Esperanto kaj lingvistiko. En: *Esperantisto*, Praha, n-ro 9, p. 102-103, 1947; *Espero katolika*, n-ro 387, p. 28; n-ro 388, p.4-5, 1947

- Otto Jespersen kaj liaj helplingvaj teorioj. En: *Espero Katolika* (1948/49) vol. 44, n-ro 382, p.124; n-ro 383, p. 138-139; n-ro 384, p. 140-150; n-ro 385, p. 171

- *Kunsttalen*. En: *Levende talen* (Groningen), 1949p. 25-42

- "Latino macaronico". En: *Esperantologio II* (1961), p. 136-138

- *Lingua ignota simplicem hominem Hildegardem prolata*. En: *Journal of Planned Languages* Nr. 15 (July-August) 1992, p. 9-12

[Informilo por Interlingvistoj](#)

[Esperantologio kaj Interlingvistiko](#)

[Centro de Esploro kaj Dokumentado](#)

---

Sendu demandojn au komentojn al [Mark Fettes](#).